# Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Januaro : 1 2022


## NULIGITA DONACO DE LA EKSA TAJVANA AMBASADEJO EN MANAGVO, FARE DE LA NIKARAGVA REGISTARO

La pasintan semajnon, la tajvana registaro minacis prezenti plendon kontraŭ Nikaragvo, pro la “konfisko” de la sidejo de ties ambasado kaj aliaj propraĵoj apartenantaj al tajvana registaro, kiuj troviĝas en tiu centramerika lando.

Laŭ la ministerio pri eksteraj rilatoj de Tajvano, la nikaragva registaro konfiskis la sidejon de ĝia eksa ambasadejo, kiu estis donacita ĵuse al la romia katolika eklezio en Managvo, ĉefurbo de Nikaragvo, post la ĉeso de diplomatiaj rilatoj inter Nikaragvo kaj Tajvano, decidita de tiu lando komence de la monato decembro.

Tiam, reprezentanto de la nikaragva registaro deklaris, ke la Ĉina Popola Respubliko estas la ununura laŭleĝa ŝtato reprezentanta la tutan Ĉinion, do Tajvano estas ne-cedebla parto de la ĉina teritorio.

Post tiuj deklaroj, Tajvano decidis donaci la sidejon de sia ambasadejo en Managvo kaj aliajn propraĵoj al romia katolia eklezio. Estas necese diri, ke la Sankta Seĝo, diplomatia nomo de Vatikano, subtenas diplomatiajn rilatojn kun Tajvano, ne kun la registaro de Pekino.



La registaro de Nikaragvo informis, ke ĉiuj proprietaĵoj de Tajvano en tiu centramerika lando pasos al Ĉinio, pro la fakto, ke la agnosko de ununura Ĉinio nepre kuntrenas, ke ĉiuj nemoveblaĵoj, mebloj, instrumentoj, ekipaĵoj kaj rimedoj kiuj antaŭe apartenis al Tajvano, pasos al Ĉina Popola Respubliko. Do, oni nuligos la donacojn plenumitajn. Nuntempe, nur 14 ŝtatoj en la mondo daŭre agnoskas la registaron de Tajvanon kiel reprezentanton de la ĉina respubliko.

# Vorto de la Semajno

**Adulto:** seksa rilato inter du homoj el kiuj almenaŭ unu jam estas edziĝinta al alia persono, do konsistas ĉefe en rompo de la geedza fideleco.

*En malmultaj landoj la adulto estas konsiderata delikto, kvankam en kelkaj el ili oni punas la virinan adulton je morto.*

**Adulti** (ntr): koiti kun alia partner(in)o, ol sia edz(in)o, se almenaŭ unu el ili jam estas edziĝinta al alia homo.

**Adultulo**: Iu kulpa je adulto.



Surmura pentraĵo reprezentanta adultulinon antaŭ Jesuo.
5-a jarcento. Raveno (Italio)

## Ĉu vi konas jur-studentojn esperanto-parolantajn?

Unu el la membro-kategorioj de IJEA estas "Membro-Studento (MT)".
Ĝi estas kategorio pripensita por tiuj kiuj studas por atingi diplomon pri Juro.
MT-oj pagas nenion kiel kotizon.

Do, se Vi konas esperanto-parolantojn kiuj studas juron en universitata fakultato, bv. sciigi al li pri nia asocio.